Christer Kiselman

Akademio de Esperanto fronte al novaj taskoj

Resumo

La Akademio de Esperanto estis fondita en 1905. Laŭ sia nuna statuto ĝi havas 45 membrojn. ˆĜi laboras ĉefe en sekcioj. Tiu ĉi artikolo resumas la novajn taskojn kiujn la Akademio frontas kaj donas superrigardon pri aktualaj projektoj.

Summary

The Esperanto Academy faces new tasks

The Esperanto Academy was founded in 1905. According to its current constitution, it has 45 members. It works primarily in sections. This article summarizes the new tasks facing the Academy and provides an overview of current projects.

1 Enkonduko

Akademio de Esperanto estas sendependa lingva institucio, fondita kiel Lingva Komitato en 1905.

La nuna teksto volas prezenti la Akademion de Esperanto en la nuna mondo, kie la kondiĉoj estas iom malsamaj ol en 1905. Pro tio la taskoj kaj la fokuso de la laboroj estas — –tute nature kaj neeviteble — –aliaj. La reviziita teksto unuavice prezentas la aferojn kiel ili statas en decembro 2015, sed per notoj kaj krominformoj legonto povos vidi kiel estis ankaŭ en julio 2014.

2 Membroj

La Akademio havas laŭstatute kvardek kvin membrojn (Statuto: Artikolo 3), kiuj servas por naŭ jaroj kaj estas plurfoje reelekteblaj (Statuto: Artikolo 4). En 2014 ĝi havis 42 membrojn; nun 40.

Ili estas:

Vilmos Benczik
Gerrit Berveling
Marek Blahuš
Marjorie Boulton
Renato Corsetti
Marcos Cramer
Probal Dasgupta
Michel Duc Goninaz
Rudolf Fischer[2]
Edmund Grimley-Evans
Paul Gubbins
Stano Marček
Aleksandro Melnikov
Carlo Minnaja
Pavel Možajev
Brian Moon
Nguyen Xuan Thu
Barbara Pietrzak
Sergio B. Pokrovskij
Otto Prytz
Baldur Ragnarsson
Christer Kiselman[1]
Boris Kolker
Koutny Ilona
Katalin Kováts
Erich-Dieter Krause
Harri Laine
Jouko Lindstedt
François Lo Jacomo
Anna Lowenstein
Ma Young-tae
Carmel Mallia
Ranganayakulu Potturu
Tsvi Sadan
Saka Tadasi
Alexander Shlafer
Humphrey Tonkin
Usui Hiroyuki
Amri Wandel
John C. Wells
Bertilo Wennergren
Yamasaki Seikô

1 Mi demisiis 2015-12-15.

2 Rudolf Fischer skribis 2015-04-15: “Mi tial petas vin, akcepti mian eksmembriĝon kaj konfirmi ĝin” kaj en posta letero aldonis: “Mi volas min nun koncentri al la finverkado de mia lernolibro *Esperanto en dialogo por German-lingvanoj* kaj tial bezonas liberigon de pliaj funkcioj.” La prezidanto kun granda bedaŭro akceptis lian peton 2015-04-22.

3 Korespondantoj

La Akademio havas hodiaŭ dek kvin korespondantojn:

Wael Al-Mahd[i3]	Mélanie Maradan[4]
Marc Bavan[t4]	Veronika Poór[4]
Detlev Blanke[3]	A. Giridhar Rao[3]
Joakim Enwall[3]	Orlando E. Raola[4]
Sabine Fiedler[3]	Keyhan Sayadpour Zanjani[3]
Federico Gobbo[3]	Esther Schor[3]
Wim Jansen[3,5]	Sara Maria Rosaria Spanò[4]
Ingrid Maier[3]	José Antonio Vergara Olavarría[4]

Ni konkludas el la notoj ke la nombro de korespondantoj estis sinsekve 10, 16, 15.

4 Estraro

Mi estis elektita al la prezidanteco 2013-09-26 kaj akceptis servi 2013-10-05. Mi demisiis 2015-12-15. Tial la estraro momente, antaŭ la elekto de nova prezidanto, havas tri membrojn.

Vicprezidantoj: Probal Dasgupta (aganta prezidanto) kaj Brian Moon.

Ĝenerala sekretario kaj kasisto: Renato Corsetti.

3 Nomumita por la periodo 2013-12-15 – 2022-12-15

4 Nomumita por la periodo 2014-12-15 – 2023-12-15

5 Wim Jansen per letero de 2015-09-11 petis liberigon de la posteno de korespondanto de AdE. Kiel klarigon li skribis: “Miaj esploroj pri la eŭskaj lingvo kaj kulturo postulas pli kaj pli da tempo kaj da sindediĉo, kaj mi decidis iom post iom liberiĝi el miaj Esperanto-funkcioj.” La prezidanto kun granda bedaŭro akceptis lian peton la saman tagon. (Li restos en la redakta komitato de la scienca revuo *Esperantologio/Esperanto Studies*.)

5 Sekcioj, komisionoj kaj ties direktoroj

Sekcioj	**Direktoroj**
Faka lingvo	Sergio Pokrovskij
Gramatiko	Bertilo Wennergren
Ĝenerala vortaro	Marcos Cramer
Lingva Konsultejo	Alexander Shlafer
Literaturo	Paul Gubbins
Prononco	Probal Dasgupta
Kontrolado de lerniloj	Anna Lowenstein
Komisionoj	**Direktoroj**
Historio de Akademio de Esperanto	Carlo Minnaja
Komisiono pri homaj nomoj	Nguyen Xuan Thu

6 Celoj kaj taskoj

Inter la taskoj de Akademio de Esperanto estas menciinda jeno: “La Akademio defendas Esperanton kontraŭ konkurencaj sistemoj de lingvo internacia” (Statuto: Artikolo 2. Taskoj). Sed nuntempe tia defendo ne estas aktuala: AdE ne bezonas batali kontraŭ Volapuko aŭ Ido.

Iuj luktas kontraŭ la angla, sed ĝi laŭ mia kompreno ne estas unu el la “sistemoj de lingvo internacia” sed *de facto* ia *lingua franca*, precipe en natursciencoj, tekniko, matematiko, turismo, populara kulturo ktp. Ankaŭ aliaj taskoj nun havas malsaman karakteron kompare al la komencaj jaroj, pro tio ke esperanto estas vivanta kultura lingvo, kies evoluon gvidas ne iu akademio sed la parolantaro.

Pro tio oni povus imagi ke la Akademio ne plu havas ion por fari. Sed tiel ne estas: la Lingva Konsultejo, gvidata de Alexander Shlafer, bonege funkcias kaj donas konsilojn al la parolantoj. Tiuj konsiloj ne estas oficialaj decidoj, sed la respondoj venas multe pli rapide ol tiuj ĉi kaj tial konsistigas bonegan servon.

Alia sekcio, Kontrolado de Lerniloj, gvidata de Anna Lowenstein, bonege kaj tre ambicie funkcias. Ŝia laboro ja estas gravega por estontaj lernantoj.

Granda projekto estas tiu pri la historio de la Akademio, verkata de Carlo Minnaja[6]. Alispeca estas la projekto pri homaj nomoj, gvidata de Nguyen Xuan Thu.

Sed ne nur tio. La Akademio ja povus fari multe pli.

Pro la nova situacio de nia lingvo mi opinias ke estas grave indiki novajn eblajn aktivecojn. Prezidanto ne rajtas ordoni, sed povas faciligi kunlaboron kaj montri al irindaj vojoj.

7 Farindaĵoj kaj irindaj vojoj

Mi volas indiki al la membroj ke ekzistas multaj farindaĵoj kaj eblaj estontaj projektoj. Mi faris tion plurfoje dum la pasintaj du jaroj. En Cirkulero 270, kies titolo estas *Agado de Akademio de Esperanto en Bonaero kaj Lillo kaj aliloke*, aperas kelkaj tiaj indikoj (vidu sube).

7.1 Scienca priskribo de Esperanto

Wim Jansen plurfoje substrekis la dezirindon havi sciencan priskribon de la lingvo esperanto, kiu laŭ li ankoraŭ mankas. Vidu ekzemple (Jansen, 2015), kie li alvokas Akademion de Esperanto ke ĝi ekokupu sin pri la verkado de referencgramatiko. En mia memprezento (2013:10) mi menciis tiun dezirindon kaj indikis ke la strukturo uzata en la sveda gramatiko(Telman 1999) povus esti imitinda. La gravo de tia projekto certe daŭras. Sed ne estas facile vidi kiel AdE povas baldaŭ realigi ĝin. Ia anstataŭaĵo estas la libroprojekto *Aliroj al esperanto* (vidu sube).

7.2 Volapuko: Cirkulero 270, sekcio 9

Ekzistas pluraj publikigaĵoj pri ebla influo de volapuko al esperanto: vidu mian artikolon (2011:106–109) kaj la referencojn tie. Sed ne ĉio estas plene esplorita.

6 *Historio de la Akademio de Esperanto* aperis en 2018 (Milano: IEF).

7.3 Nomoj de kemiaj elementoj: Cirkulero 270, subsekcio 13.3

Mi alvokis en Bonaero al neformala renkontiĝo kun José Antonio Vergara, prezidanto de la scienca asocio ISAE kaj estrarano de UEA, kaj Orlando E. Raola, profesia kemiisto, kiu povus helpi al AdE pri kemiaj nomoj. Estas ja ege dezirinde havi la nomojn de la kemiaj elementoj kaj multajn aliajn nomojn en formo kiel eble plej akceptebla. La tri partoprenantoj de tiu ĉi kunsido ĉiuj esprimis fortan strebon al kunlaboro kaj interkonsento.

7.4 Vikipedio: Cirkulero 270

Dietrich Michael Weidmann menciis en Bonaero ke tre malofte akademianoj partoprenas en la verkado de artikoloj en Vikipedio. Estas evidente dezirinde havi akademianojn en tiu rolo.

7.5 Historio kaj nuntempa debato: Cirkulero 270, subsekcio 13.6

Esther Schor, kiu kune kun José Antonio Vergara organizis la Esperantologian Konferencon en Bonaero, prezentis tie studon sub la titolo "Zamenhof kaj la liberala-komunumisma debato." Temas pri la historia fono de esperanto, sed ankaŭ pri esperanto enkadre de nuntempaj debatoj en la kampoj de politiko kaj filozofio. Evidente membroj povos, kune kun Esther Schor, korespondanto de AdE, fari multajn studojn pri la historia fono de esperanto kaj la nuntempaj debatoj; ĉi-rilate menciindas ankaŭ la kompetenton de Sara Spanò, same korespondanto de AdE (subsekcio 7.17).

Mi mem nun studas jidon en Universitato de Lund por pli bone kompreni la riĉan kulturon en kiu naskiĝis Esperanto.

Mi komencis studi la ruslingvan jido-gramatikon de Zamenhof, verkitan proksimume en 1880 kaj plene publikigitan nur en 1982. Komparo inter lia reformo de Jido kaj Lingvo Universala montras similajn trajtojn kaj strebojn.

7.6 Pri-esperanta lingvoscienco: Cirkulero 270, subsekcio 13.6

Marcos Cramer parolis dum la Esperantologia Konferenco en Bonaero pri la temo "Ĉu tamen eblas pri-Esperanta lingvoscienco?" Evidente ĉi tie multo estas farinda kaj farenda.

7.7 Terminologio: Cirkulero 270, subsekcio 13.7

Cele al ebla estonta kunlaboro inter AdE, ISAE kaj UEA pri terminologio mi alvokis en Bonaero al renkontiĝo kun José Antonio Vergara kaj Mélanie Maradan, komisiito de UEA ĉe ISO/TC37 kaj Infoterm, estrarano en Infoterm dum la periodo 2013–2016.

Kiel mi indikas en mia artikolo (2015:87) la problemoj en terminologio estas tro multnombraj por traktado fare de la Akademio. Sed tio ne signifas ke akademianoj ne povas fari utilajn studojn kaj starigi helpajn rekomendojn pri terminologiaj principoj. AdE havas ĉi tie grandan kaj gravan kampon antaŭ si.

7.8 Volapuko denove: Cirkulero 270, sekcio 16

Jean-Claude Caraco estis elstara interlingvisto kaj esperantologo kaj konis multajn lingvojn, i.a. Volapukon kaj la bretonan. Mi vizitis lin en lia hejmo en Feyzin 2014-12-20. Li bedaŭrinde forpasis. Mi havas bonan rilaton kun la Cifal Volapüka, Hermann Philipps, kaj li certe povos, kunlabore kun iuj membroj, fari interlingvistikajn studojn; vidu subsekcion 7.2 kaj punkton (A) en subsekcio 7.11.

7.9 Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds: Cirkulero 270, sekcio 18

Indas esplori la eblojn kunlabori kun la Kultura Centro Esperantista. Mi vizitis la centron en 2009 kaj 2015.

7.10 CDELI en La Chaux-de-Fonds

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) estas parto de la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds. Mi vizitis

ĝin en 2015. Ĝi havas riĉegan kolekton de ĉiaj dokumentoj, ne nur pri esperanto sed ankaŭ pri aliaj lingvoj. Ĝi estas trezorejo, tre valora kaj vizitinda por pluraj specoj de esplorado.

7.11 La privata kunsido de membroj kaj korespondantoj en Lillo: Cirkulero 270, subsekcio 19.4

Mi memorigu pri la punktoj starigitaj de vicprezidanto Probal Dasgupta kaj enmetitaj en la tagordon de la privata kunsido en Lillo:

(A). *Science*. Se labori science, tiam la Akademio ne povas limigi sin al esperanto; necesas pli vasta perspektivo, inkludanta ĉiujn planlingvojn kaj ĉiujn fontolingvojn de esperanto (jido, la rusa, la germana, la pola, la franca, latino, la klasika greka, la angla, k.t.p.); temas sekve pri interlingvistiko. Inter la membroj kaj korespondantoj troviĝas kompetento, sed scienca perspektivo iom kontraŭas la taskon defendi esperanton "kontraŭ konkurencaj sistemoj de lingvo internacia".

(B). *Lernade*. Aktiveco pri lernado povas esti pli kompetente traktata de aliaj instancoj, ekzemple la instruista ligo ILEI; edukado.net; la amsterdama katedro. Tamen, membroj kaj korespondantoj ja povus kontribui per plej diversaj spertoj.

(C). *Kontinue* kun la kolektivaj votoj faritaj en Bulonjo ĉe Maro en 1905, la laboro pri la *Deka Oficiala Aldono* kaj pri la *Akademia Vortaro* apartenas al tiu kampo de aktiveco.

7.12 Projekto pri jarraportoj: Cirkulero 270, sekcio 21

La estraro proponis ke AdE eldonos jaran raporton en 2017 por la jaro 2016; en 2018 por la jaro 2017 k.t.p. Sed ĉar tia raporto ne estis farita antaŭe, la estraro proponis ke la unua raporto aperu en 2016 kaj kovru tri jarojn: 2013, 2014 kaj 2015.

Tiu publikigaĵo kompreneble raportu pri la aktiveco de la Akademio kaj ties sekcioj kaj komisionoj. Sed ne nur: ĝi raportu pri la aktiveco de ĉiu membro kaj ĉiu korespondanto ankaŭ ekster la formala kadro de AdE por videbligi la multfacetan aktivecon de la membroj kaj la korespondantoj.

7.13 La libroprojekto *Aliroj al esperanto:* Cirkulero 270, sekcio 22

La estraro de Akademio de Esperanto planas eldoni libron, kiu prezentos multajn aspektojn de la fenomeno esperanto. Ĝi konsistos el pluraj ĉapitroj verkitaj de membroj kaj ne-membroj, el kiuj ĉiu donas siajn ideojn pri la lingvo kaj la kulturo portata de tiu ĉi aŭ pri aliaj rilataj temoj.

Inter la jam promesitaj kontribuaĵoj menciindas la aliroj interlingvistika, gramatika, psikolingvistika, literatura, lingvoinventa, frazeologia, lingvofilozofia, lingvosociologia, makrosociolingvistika, movadhistoria, lingvokulturologia kaj hedonisma.[7]

7.14 Interkultura komunikado

Kristin Tytgat prezentas en sia studo (Tytgat, 2015) multajn eblajn esplorprojektojn pri interkultura komunikado.

7.15 *Esperantologio / Esperanto Studies*

La scienca revuo *Esperantologio / Esperanto Studies* estas ia daŭrigo de *Esperantologio*, publikigita de Paul Neergaard dum la jaroj 1949–1961. Ĝi estas sendependa de Akademio de Esperanto, sed en ĝia redakta komitato membras pluraj membroj kaj korespondantoj de AdE, kies valorega helpo estas necesa antaŭkondiĉo por ĝia funkciado.

7.16 *Interdisciplinary Description of Complex Systems*

La revuo *Interdisciplinary Description of Complex Systems* (INDECS) publikigis en sia kajero 2, volumo 13 (2015), dek tri artikolojn, kiuj priskribas multajn aspektojn de la fenomeno esperanto rigardata kiel kompleksa sistemo. El la artikoloj la plimulto estas verkita de membroj aŭ korespondantoj de Akademio de Esperanto.

7.17 Kunlaboro kun la korespondantoj

Pliajn eblojn de novaj studoj ebligas la korespondantoj. Artikolo 7 en la statuto diras:

7 Intertempe la libro aperis: Kiselman, 2018.

> Povas fariĝi *Korespondantoj de la Akademio* eminentaj personoj, kies okupoj aŭ funkcioj ne permesas al ili regule partopreni en la laboroj de la Akademio, sed kiuj deziras doni al ĝi la apogon de sia nomo. La Korespondantoj ricevas ĉiujn akademiajn dokumentojn kaj povas eventuale esti konsultitaj pri lingva demando rilata al ilia specialeco. Ili ne havas voĉdonrajton.

Mi ricevis 1988-10-20 sen-datan version de la statuto, kies artikolo 7 estas la sama kiel la ĵus citita krom en kelkaj tipografiaj detaloj.
Estas interese vidi kiel statas la aferoj rilate al eblaj farotaĵoj fare de la membroj en kunlaboro kun la dek kvin korespondantoj:

- Wael Al-Mahdi en Barejno estas grava kontakto kun arablingvanoj.
- Marc Bavant, membro de Akademio de Esperanto dum la jaroj 2004–2013, laboras en la kampo de komunikretoj kaj laborrilatoj. Fininte la Interlingvistikajn studojn en Poznano, li doktoriĝis en Amsterdamo (2014) pri ĝenerala lingvistiko per esploro pri la lingvoj eŭska, malnovpersa kaj elama. Poste li denove havis pli da tempo por la Akademio kaj pluraj membroj proponis ke li fariĝu korespondanto. Li nun aktivas laŭ siaj propraj interesoj.
- Detlev Blanke, aŭtoro de pluraj grandaj studoj pri interlingvistiko, estas elstara kaj aktiva interlingvisto kaj povas kunlabori pri projektoj rilate al tio. Vidu la punkton (A) en subsekcio 7.11.[8]
- Joakim Enwall, profesoro pri la ĉina kaj specialisto pri pluraj ne-hindeŭropaj lingvoj. Li povas kunlabori pri la aziaj aspektoj de nia lingvo.
- Sabine Fiedler, profesoro ĉe la Institut für Anglistik, Lepsiko. Ŝi estas specialisto pri frazeologio kaj povas kunlabori pri projektoj en tiu kampo.
- Federico Gobbo, profesoro pri interlingvistiko kaj esperantologio en Universitato de Amsterdamo. Kiel profesia interlingvisto

8 Detlev Blanke bedaŭrinde forpasis en 2016.

li povas multon kontribui al pluraj aspektoj de la akademiaj laboroj.

- Ingrid Maier, profesoro pri la rusa lingvo. Kiel specialisto pri la rusa kaj aliaj slavaj lingvoj ŝi povas kunlabori pri la slavaj komponantoj de esperanto; vidu la artikolon de Michel Duc Goninaz (1985)[9] kaj la libron de Boris Kolker (2015)[10].
- Mélanie Maradan, terminologo, evidente estos grava kunlaboranto en ĉia projekto pri terminologio. Ŝin mi jam menciis en subsekcio 7.7.
- Veronika Poór estas doktoro pri nanoteknologio kaj ekde marto 2016 direktoro de la Centra Oficejo de UEA. Ŝi povas kunlabori pri multaj projektoj rilataj al scienco kaj al ĉiaj organizaj demandoj.
- Giridhar Rao, fakulo pri la angla. Li flue parolas la teluguan, hindian kaj urduan kaj estas grava kontakto kun la barata movado.
- Orlando E. Raola, doktoro pri kemio, povas grave kontribui al bona elekto de kemiaj terminoj. Lin mi jam menciis en subsekcio 7.3. Li organizis la Esperantologian Konferencon en Lillo 2015 kaj jam akceptis organizi kune kun Sara Spanò la Esperantologian Konferencon en Nitro 2016.
- Keyhan Sayadpour Zanjani, prezidanto de la Irana Esperanto-Asocio, tradukinto de *La Florejo de Saadi* al esperanto kaj kunlaborinto pri la traduko de *La rakonto de Kjeŭ*. Li estas grava kontakto kun esperantistoj en Irano.
- Esther Schor, profesoro pri la angla ĉe Universitato Princeton, Usono. Ŝi instruas i.a. judan literaturon kaj tradukitan jidan literaturon. Ŝi povas kunlabori pri projektoj pri la kultura fono de esperanto. Ŝin mi jam menciis en subsekcio 7.5. Ŝi organizis kune kun José Antonio Vergara la Esperantologian Konferencon en Bonaero 2014.

9 Duc Goninaz, 1985.
10 Kolker, 2015.

- Sara Spanò doktoriĝis ĉe la Universitato de Torino en 2011. Ŝi rekonstruis historion kaj la evoluon, inter Oriento kaj Okcidento, de la koncepto de malagemo (latine *acedia*). Ŝi dum longa periodo studis la hebrean, kaj biblian kaj novan, kaj estas valorega kontakto pri latino, iam internacia lingvo, kaj pri la juda kulturo. Ŝi nun kunmastrumas esplorprojekton pri metalingvistikaj kapabloj, kunlabore kun kvar aliaj universitatoj. Ŝi jam akceptis organizi kune kun Orlando Raola la Esperantologian Konferencon en Nitro 2016.
- José Antonio Vergara estas medicinisto pri publiksana epidemiologio, prezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperanta (ISAE) kaj estrarano de UEA. Li estas valorega kontakto pri ĉiaj projektoj rilate al sciencoj. Li organizis kune kun Esther Schor la Esperantologian Konferencon en Bonaero 2014.

Kiel oni povas vidi supre el tiuj mallongaj priskriboj, specifajn taskojn la korespondantoj aŭ jam plenumas, aŭ povos plenumi. Kune kun la aliaj invitoj prezentitaj supre, la korespondantoj reprezentas invitojn al projektoj, se iu akademiano volas komenci studon rilatan al la menciitaj kompetentoj. Temas pri estontecen direktita ideo inviti al novaj, ankoraŭ ne komencitaj, studoj.

8 Konkludo

La lukto kontraŭ volapuko kaj ido ne plu estas aktuala; esperanto estas vivanta kultura lingvo kies evoluon gvidas la parolantaro. Pro tio oni povus imagi ke Akademio de Esperanto ne plu estus bezonata kaj havus nenion por fari. Sed konsiloj pri bona lingvaĵo estas ĉiam deziritaj.

Akademianoj faras multajn gravajn aferojn kiujn mi ne menciis ĉi tie. Sed mi indikis en subsekcioj 7.1–7.17 plurajn eblajn estontajn projektojn. Ili espereble restos dum multaj jaroj, kio signifas ke la Akademio havas antaŭ si multajn eblajn farindaĵojn kaj eĉ farendaĵojn kaj tio veras sendepende de venontaj elektoj de estraranoj kaj direktoroj.

9 La plej sekura laborplano

La plej sekura laborplano sendube estas tiu priskribita de Raymond Schwartz (1894–1973) en la poemo *Vivu do l' Akademi':*

> Certe ke l'Akademi'
> estas kompetenta,
> kaj neniam ĝi eraras,
> kiam ĝi nenion faras,
> tio estas evidenta.

Cititaj verkoj

Akademio de Esperanto (2009). *Statuto*. Redakta revizio de 2009-10, 5 pp.

Akademio de Esperanto (2015). *Agado de Akademio de Esperanto en Bonaero kaj Lillo – kaj aliloke*. Cirkulero 270, 2015-10-03, 21 pp. <www.akademio-de-esperanto.org> <www.cb.uu.se/~kiselman/>.

Duc Goninaz, Michel (1985). Pri la influo de la slavaj lingvoj al Esperanto el leksikologia vidpunkto. In Violin Oljanov (Ed.), *Interlingvistiko; Esperantologio* (pp.77-84). Sofio: Bulgara Esperantista Asocio.

Jansen, Wim (2015). Was ist und wozu brauchen wir eine Referenzgrammatik des Esperanto? In

Cyril Brosch & Sabine Fiedler (Eds.), *Die Plansprachenbewegung rund um den Ersten Weltkrieg. Beiträge der 24. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 21. – 23. November 2014 in Berlin*. *Interlinguistische Informationen*, Beiheft 22 (pp. 97-107). Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik.

Kiselman, Christer (2011). Variantoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof. *Esperantologio / Esperanto Studies*, *5*, 79–140.

Kiselman, Christer (2013). *Memprezento*, 2013-07-05, 14 pp. <www.cb.uu.se/~kiselman/>.

Kiselman, Christer (2015). Kombineblo de vortelementoj de Esperanto: Rigardoj malantaŭen kaj antaŭen. *Esperantologio / Esperanto Studies*, *7*, 73–125.

Kiselman, Christer Oskar (2018) (Ed.). *Aliroj al Esperanto.* Dobřichovice: KAVA-PECH.

Kolker, Boris (2015). *Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto. Referaĵo de la disertacio defendita en la 1985-a jaro*. Monda Asembleo Socia (MAS), *116*, 8–28. ISBN 978-2-36960-020-6.

Minnaja, Carlo (2018). *Historio de la Akademio de Esperanto.* Milano: Itala Esperanto-Federacio.

Oljanov, Violin (1985) (Ed.). 1985. *Interlingvistiko; Esperantologio.* Sofio: Bulgara Esperantista Asocio.

Teleman, Ulf; Hellberg, Staffan; Andersson, Erik (1999). *Svenska Akademiens grammatik* [*La gramatiko de la Sveda Akademio*]. Stockholm: Svenska Akademien.

Tytgat, Kristin (2015). Eine Sprache, viele Kulturen. Interkulturelle Kommunikation auf Esperanto. In Cyril Brosch & Sabine Fiedler (Eds.)**,** *Die Plansprachenbewegung rund um den Ersten Weltkrieg***.** *Beiträge der 24. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 21. – 23. November 2014 in Berlin***.** *Interlinguistische Informationen***,** Beiheft 22 (pp. 109-115). Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik.

Christer Oscar Kiselman estas homo. Iom pli precize li estas matematikisto kiu parolas la svedan, esperanton, la anglan kaj la francan. Li estas gastprofesoro ĉe Upsala universitato. Li esploris pri partaj diferencialaj ekvacioj, kompleksa analitiko kaj kompleksa geometrio, eĉ en spacoj de nefinia dimensio. Nuntempe li esploras ĉefe pri digita geometrio, matematika morfologio kaj diskreta optimumado. Li gvidis dek ok personojn el sep landoj al doktoreco (1974–2016). La interparoladoj okazis en kvar lingvoj. En la lernejo li studis la anglan, la germanan kaj la francan kaj private ekstudis la rusan je la aĝo de dek tri jaroj. Li vivis pli ol unu jaron en Usono kaj pli ol du jarojn en Francio. Sekvis pli malfrue studoj de la persa (2007–2009) kaj de la klasika greka (2010–2011) en Upsala universitato; de jido en Lunda universitato (2015–2016) kaj de jido en Weimar, julie de 2016. Li estis membro de AdE dum 26 jaroj, de 1989 ĝis 2015, kaj ties prezidanto de 2013-10-05 ĝis 2015-12-15.